

Esperanto
V-19479/46

(1977)

Vol.

Bulgara

ESPERANTISTO





Estante centro de multaj kaj brilaj kulturoj, estante unu el la suproj de la monda civilizacio, Eŭropo kapablas doni bonan ekzemplon en konstruo de interŝtataj rilatoj surbaze de firma paco.

El la parolado de L. I. Breĵnev en la Konsultiĝo pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo — Helsinki, 1975

ENHAVO

Todor Jivkov. Jaro de paco, jaro de ba'alo	1
* * Profunda estimo, sincera amo	3
* * Adreso de CE de BEA al L. I. Breĵnev	4
* * La justa solidara batalo venkis! Luis Kor'alan libera!	4
Humphrey Tonkin. Novjara mesaĝo	5
Kostadin Kolev. Ivan Matev	6
St. Bakalova, Iv. Deĉev. Metodika E-seminario	7
St. Bakalova. Instruado de Esperanto en Maĝliĝ	7
Nedjalko Jordanov. Komunistoj. Tradukis Li'i Koleva	8
Asen Linov. Mia kanto	8
Nevena Nedelĉeva. Floroj de la amikeco	8
Trifoi Mihai. Esperanto-aktiveco en Braŝov	12
T. Bercis. El la agado de latvaj esperantistoj	12
* * Esperanto-lernejo „Bratislavaj majoj 1977“	12
* * Koncize	13
J. Gold. Entuziasmo „ekde infanaĝo“	13
Dimitro Haĝiev. Laŭdinda entrepreno (Pri „S jencaj Komunikadoj“)	14
Galina Tihaja. Panpeco	15
* * Enigmo. Tra la gazetaro. Deziras korespondi. Listo de E-veteranoj ka	III—IV

Sur la kovrilpaĝo :

La ĝenerala sekretario de la Monda Packonfiro Romeŝ Ĉanĉra enmanigas al L. I. Breĵnev „La Oran Medalon de la Paco“ — 1975 j.

Redakta Komitato :

Kunĉo VĀLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Ljuba BOJAĜIEVA, Dimitro DENĈEV, Ĥristo GOROV, Marin BĀCEV, Dimitro HAĜIEV, Krāstju KARUCIN, Haim LEVI, Vasja PETROVA.

Korektis Vasia Petrova

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

Sur la fotoj: Bulgaraj E-veteranoj partoprenintaj la Kongreson de la Bulgaraj Esperantistoj en Ruse, 1976. Meze: la sekretario de la sekcio de E-veteranoj S'oĵan Kos'adinov.

Ekspozicio de bildkartoj en Veliko Tŕrnovo pri naciaj kostumoj el la tuta mondo, kolektitaj dum 20 jaroj pere de Esperanto de nia fervora s-ano Ĥristo Dolĉinkov (sur la foto).

E-kurso en v. Borislav, dis'rikto Pleven, gvidata de s-ano Georgi Dimov el la sama vilaĝo.

**JARO DE PACO, JARO DE Batalo***

TODOR JIVKOV

unua sekretario de CK de BKP,
prezidanto de la Ŝtata Soveto de
PR Bulgario

Por la bulgara popolo kaj la tuta socialisma komunaro 1976 estis bona, fruktodona jaro, jaro de paca laboro kaj batalo. Laŭ ritmoj de ekonomia kresko nia lando hodiaŭ okupas unu el la unuaj lokoj en la mondo. En la lasta kvinjaro nia nacia enspezo kreskis per 46%, kaj la socia produktiveco de la laboro — per pli ol 44%. Surbaze de tiuj ĉi sukcesoj kaj konekse kun la decidoj de la XI Kongreso de la Bulgara Komunista Partio, okazinta en tiu ĉi jaro, ni komencis efektiviĝi decidan ŝanĝon en la plialtigo de la efikeco kaj la kvalito de la produktado, de ĉiuj sociaj aktivecoj...

Ni havas la plenan rajton diri, ke la ekonomia, kultura kaj socipolitika potencialo de nia socio kreskas kaj fortikiĝas, ke konstante plialtiĝas la vivnivelo de la popolo, ke ni marŝas rekte kaj certe sur la vojo de socialismo. Tio estas komuna leĝkonformeco, kiu manifestiĝas en ĉiuj landoj de la socialisma komunaro.

Alia grava tendenco, kiu kun ankoraŭ pli granda forto manifestiĝis en 1976 j., estas la profundigo de la ĉiufanka kunlaborado kaj amikeco de Popola Respubliko Bulgario kun Sovetunio kaj la ceteraj frataj socialismaj landoj.

La plenumado de la kompleksa programo de socialisma ekonomia integriĝo fariĝis unu el la decidaj faktoroj por la dinamika ekonomia progreso de niaj landoj, por la fortikiĝo de la ekonomia potenco de la socialisma komunaro, por la plua kresko de la internacia aŭtoritato de la Konsilio por Ekonomia Interhelpo. Ekde la forpasinta jaro la landoj de tiu Konsilio komencis labori laŭ la unua akordigita plano por multflankaj integraj entreprenoj dum la periodo 1976—1980 j. La historio de la internaciaj ekonomiaj rilatoj ankoraŭ ne konas tian planon. La spertoj, kolektitaj en la starigo de novtipaj rilatoj inter la landoj de la socialisma komunaro, ekhavas ĉiam pli grandan principan signifon por la popoloj, kiuj batalas por egalrajteco kaj reciproke utilaj ekonomiaj ligoj, sen ia ajn diskriminado.

Grava politika evento, karakteriza pri nia disvolviĝo, estas la akordigitaj eksterpolitikaj agoj de la frataj socialismaj landoj por profundigo kaj

*P. rton el la artikolo ni prenas el gazeto „Problemoj de la paco kaj la socialismo“, n-ro 12, 1976 j.



plivastigo de la malstreĉeco en la internacia vivo kaj helpe al la popoloj, kiuj batalas por libero kaj sendependeco.

La sukcesoj en la konstruado de evoluinta socialisma socio kaj de komunisma socio kaj nia pacama ekstera politiko senĉese pligrandigas la altiran forton de la reala socialismo. „La socialismo, kiel notis L. I. Breĵnev en la XXV kongreso de KPSU, jam havas grandegan efikon sur la pensojn kaj la sentojn de centoj da milionoj da homoj sur la tero. Ĝi certigas por la laborhomoj liberon, vere demokratiajn rajtojn, bonstaton, plej vastan aliron al la scienco kaj firman certecon je la estonto. Ĝi portas pacon, estimon al la suvereneco de ĉiuj landoj kaj egalrajtan interŝtatan kunlaboradon, ĝi estas apogo de la popoloj batalantaj por sia libero kaj sendependeco. La morgaŭa tago sendube donos novajn pruvojn pri la senlimaj eblecoj de la socialismo, pri ĝia historia supereco antaŭ la kapitalismo.“

La sukcesoj de Bulgario en la sfero de la ekonomio, en la disvolviĝo de scienco kaj kulturo, en plialtigo de la bonstato de la popolo, kiuj transformis ĝin en evoluantan socialisman ŝtaton, efikas ekskluzive favore al ĝia eksterpolitika agado kaj altigas ĝian internacian aŭtoritaton. Por tio kontribuas ankaŭ la fakto, ke nia lando donas, laŭ siaj ebloj, helpon al la naciliberiga movado, efektivigas aktivan eksteran politikon kaj disvolvas amikajn rilatojn kun la ceteraj landoj kaj popoloj surbaze de reciproka fido kaj kompreniĝemo, egalrajteco kaj reciproke utila kunlaborado. Jen jam 32 jarojn post la venko super la faŝismo Bulgario kune kun la ceteraj popoloj de Eŭropo ĝuas la bonojn de la internacia paco. En la nova historio de nia lando ne ekzistas tiel longa paca periodo. Kaj en tio ni vidas la historian meriton de la tutmonda socialismo.

En la intima unuiĝo de la landoj de la socialisma komunajo, en la unueco kaj la kunagado de la frataj partioj kaj de la progresemaj fortoj en la mondo la Bulgara Komunista Partio vidas la garantiaĵon de novaj sukcesoj survoje al la paco kaj la socialismo.

Paralele kun la principa kaj konsekvenca subteno al ĉiuj iniciatoj favore al la paco kaj la sereniĝo en tutmonda skalo PR Bulgario donas sian kontribuon por la disvolviĝo de tiu proceso ankaŭ sur la Balkanoj.

La batalo por paco kaj socia progreso disvolviĝas ankaŭ laŭ la linio de tiam pli forta subteno, kiun la vastaj popolamasoj donas al la pacaj iniciatoj. Ni taksas eksterordinare alte la signifon de tiu ĉi fakto. La stabila paco ne povas esti konstruita nur pere de klopodoj de la registaroj; sur tiu kampo neanstataŭeblan rolon ludas la popolamasoj, ĉiuj demokratiaj fortoj kaj movadoj.

La historiaj ŝanĝoj en la korelativeco de la fortoj sur la internacia areno favore al la socialismo daŭras. Malgraŭ la furioza kontraŭstaro de la reakcio la eblecoj por sukcesa antaŭeniro de la homaro sur la vojo de paco kaj socia progreso plimultiĝas. Tial ni rigardas la estonton kun plenrajta optimismo kaj ni laboras konvinkite por solvo de la malfacila, sed grandioza historia tasko — la tasko por plua fortikigo de la komuna paco, por atingo de novaj sukcesoj en la batalo por libero, sendependeco, demokratio kaj socialismo.

GRAVA!

URĜA!

Abono al «Bulgara Esperantisto» ankoraŭ eblas!

Varbu novajn abonantojn kaj la abonketizojn sendu per poŝtmandato je adreso:
1303 Sofio, Bulgara Esperantista Asocio, bul. Ĥr. Botev 97, DSK Blagoevski rajon,
smetka 185/1052. Aparte sendu al ni liston de la abonantoj.



En decembro 1976 ĉiuj progresemaj homoj en la mondo, la tuta pacama homaro notis emocian jubileon — la 70-jariĝon de la ĝenerala sekretario de Komunista Partio de Sovetunio k-do Leonid Iliĉ Breĵnev.

Inda filo de la granda soveta lando, fidela batalanto por la epokfara afero de la Lenin-partio, L. I. Breĵnev kunigas en sia personeco la plej bonajn, la plej intimajn strebojn de nia nuntempulo — la senlacan konstruan laboron por la triumfo de la komunisma idealo, la necedeman batalon por daŭra paco, interkompreniĝo kaj bonstato por ĉiuj popoloj en la mondo.

Jam dekdu jarojn Breĵnev staras sur la ŝipestra ponteto de KPSU kaj la Soveta Ŝtato kaj lerte, talente, senlace kaj celdirekte gvidas la sovetan popolon en ties irado al komunismo.

Inda heredanto kaj daŭriganto de la afero de senmorta Lenin, Breĵnev enkorpiĝas la senfine allogan, legendecan bildon de la soveta homo kaj komunisto, de tiu heroa generacio, kiu de fruaĝo ekmarŝis sub la flago de la venkinta Oktobra Revolucio kaj fordonis sian tutan junecon, siajn fortojn kaj inspiron al la konstruado de la unua en la mondo ŝtato de laboristoj kaj vilaĝanoj, pri kiu la laboruloj el la tuta mondo senfine fieris kaj fieras, kvazaŭ ĝi estas illa propra patrolando.

La malstreĉiĝo en la internaciaj rilatoj, la rezultoj de la penado fari ĝin nereturnebla proceso estas nedisigeble ligitaj kun la grandega laŭsia skalo agado de la ĝenerala sekretario de CK de KPSU. Li merite akiris la aŭtoritaton de arkitekto de la tutmonda paco kiel inspiranto kaj kreanto de la Pacprogramo, akcep-

tita de la XXIV Kongreso de KPSU-pliriĉigita kaj konkretigita per la decidoj de la XXV Kongreso de KPSU

Kun la senlaca kaj ĉiuflanka agado de Leonid Iliĉ Breĵnev kiel unua gvidanto de KPSU kaj Soveta Unio estas ligitaj ankaŭ la kvalite novaj procesoj en la disvolviĝo de la amikeco, kunlaborado kaj integriĝo de la frataj landoj el la socialisma komunaro. Tio plenforte validas ankaŭ pri la nova etapo en la plua firmiĝado kaj disvolviĝo de la ĉiuflankaj ligoj kaj proksimiĝado de nia lando kun la granda soveta lando. Ĉe la enmarniĝo de la plej altaj distingiloj de nia lando al L. I. Breĵnev — dua ora stelo de „Heroo de Popola Respubliko Bulgario“ kaj ordeno „Georgi Dimitrov“ — la unua sekretario de CK de BKP kaj prezidanto de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario k-do Todor Ĵivkov diris: „Aparte fruktodonaj por la disvolviĝo de la bulgara-soveta amikeco estas la dekdu jaroj, pasintaj de la momento, kiam vi ekstaris frunte de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Sovetunio.“

Profunda estimo kaj sincera, frata amo — tio estas la sentoj, kun kiuj ĉiu esperantisto, ĉiu bulgaro rilatas al Leonid Iliĉ Breĵnev. Kune kun ĉiuj sovetaĵ homoj, kun la tuta homaro, por kiu estas karaj la idealoj de socialismo, paco kaj progreso, trovintaj en la personeco de L. I. Breĵnev sian plej konsekvencon, plej senlacan kaj plej aŭtoritatan adepton kaj efektiviganton, ni celebras lian 70-jaran jubileon kun plej pura kaj sincera danko. El tutkoro ni deziras al li sanon kaj neelĉerpeblan energion en lia nobla agado kaj batalo por la triumfo de paco kaj progreso, por triumfo de la grandaj komunistaĵ ideoj.

Adreso de la Bulgara Esperantista Asocio

Al la ĝenerala sekretario de la Komunista Partio de Sovetunio
LEONID ILIČ BREJNEV

Atestimata kamarado Brejnev!

Je la nomo de 7000 organizitaj bulgaraj esperantistoj ni tutkore salutas Vin lige kun Via 70-jariĝo.

Ni deziras al Vi multjaran vivon kaj bonfarton por plue labori kiel senlaca batalanto por la monda paco kaj por la prospero de la sovetaj popoloj.

Vivu la bulgara-soveta amikeco!

SEKRETARIO: (s) Kunčo Válev

PREZIDANTO: (s) Ĥristo Gorov

La soveta popolo estas popolo de ekskluziva laboremo, braveco, eltenemo, anima malavareco, talento kaj sciĝo. Tio estas popolo, kiu ne kliniĝas en malfacila tempo. . . Ĝi estas kunsentema al la ĝojoj kaj malfeliĉoj de la aliaj popoloj, preta helpi ilin en la batalo por justeco, libero, socia progreso. La soveta popolo estas efektive granda, heroa popolo!

L. I. Brejnev

Mi fieras, ke ĉiu tago de mia vivo estas nedisigebla de la aferoj, per kiuj vivis kaj vivas nia Komunista Partio kaj nia soveta lando. Por mi la fido de la Partio, la fido de la popolo ĉiam estis kaj restas super ĉio.

El la responda parolado de L. I. Brejnev ĉe lia honorigo per la plej altaj ordenoj de USSR — „Lenin“ kaj dua „Ora stelo“ de heroo de Sovetunio

LA JUSTA SOLIDARA BATALO VENKIS! **LUIS KORVALAN LIBERA!**

Tri jarojn la nomo de la ĝenerala sekretario de la Ĉilia Komunista Partio sonis senĉese el ĉiuj punktoj de la planedo. Homoj kun plej diversaj politikaj konceptoj insistis pri lia liberigo. Lia sorto ne ĉesis emocii la progreseman internacian publikon, ĉar ĝi estis parto de la sorto de tuta heroa popolo. Dum tiu nigra por Ĉilio periodo la socialisma landaro, frunte kun Sovetunio, pruvis, ke ĝia solidareco kun la batalanta ĉilia popolo estas principa kaj pura. Tial Luis Korvalan alpaŝis la sovetan teron kiel sian naskiĝan teron, kie vivas puraj kaj kuraĝaj homoj, ĉiam fidele defendantaj la liberon, la justecon, la homan feliĉon.

La faŝista hunto komencis sian karon per la murdo de alta granda filo de la ĉilia popolo — Salvador Allende. Ĝi longe kaj obstine serĉis manieron likvidi ankaŭ Luis Korva-

lan, ne transformante lin en eterne vivan simbolon. Sed ĝi sukcesis plenumi sian deziron nek rilate al la homo, nek al la simbolo. Por la ĉiliaj „goriloj“ Luis Korvalan transformiĝis en tro pezan, ne porteblan ŝarĝon, kaj lia liberigo fariĝis por ili la nura vojo. La „goriloj“ toleris grandan malvenkon. Kaj ne nur ili, sed ankaŭ ĉiuj, kiuj ilin subtenis kaj helpis.

La liberigo de Luis Korvalan superas la ordinarajn humanajn konsiderojn, ĉar kun li estas ligita la ideo pri liberigo de tuta Ĉilio, de la tuta ĉilia popolo el la sangaj manegoj de la faŝismo.

Ni, la bulgaraj esperantistoj, same kiel nia tuta libera popolo, ĉiam aktive partoprenis la batalon por liberigo de Korvalan. Tial ni sincere ĝojas pri tiu liberigo, varme salutas la grandan antifaŝiston kaj humaniston kaj tutkore deziras al li sanon kaj bonfarton!



NOVJARA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

La pasintaj du-tri jaroj instruis al ni multajn lecionojn. El ili la plej klara estas la rimarkinda stabileco kaj interna forteco de la Esperanto-movado. Se necesus ankoraŭ pruvi tion, oni povus konstati, ke la Internacia Lingvo fariĝis neevitebla kaj nedetruibla fakto de nia epoko. La kulturo kaj socio de Esperanto estas firma elemento en la nuntempa internacia vivo.

Tio estas pli ol klara en la situacio de UEA mem. Tra ĉiuj perturboj de la ĵus pasintaj jaroj, tra ĉiuj krizoj financaj kaj organizaj, UEA tenis la flagon alte kaj laboris diligente por konservi la malnovajn gajnojn kaj prepari la grundon por novaj.

Nun ni komencas rikolti la rezultojn de tiu eksterordinara diligento — kaj ankaŭ lojalo — de nia centra stabo kaj nia membraro. En 1975 ni sukcesis registri pozitivan saldon post kelkjaraj deficitaj en niaj financoj. Feliĉe ni povas anonci similan rezulton en 1976. Kvankam la finkalkulo ankoraŭ ne estas preta, estas jam nun informeble, ke 1976 ankaŭ estos jaro de financa pluso. Tiu restarigo de la financa stabileco ankaŭ havis siajn konsekvencojn ĉe la membronombro: post kelkaj jaroj da perdo, en 1976 ni registris malgrandan gajnon en la nombro de individuaj membroj. Se oni aldonas al tio la aliĝon de kelkaj novaj landaj asocioj kaj la signifan plivastigon de la kolektiva abonado de la revuo, oni tuj ricevas bildon de asocio pli sekura, pli forta kaj pli laborpreta ol ni vidis jam de pluraj jaroj.

Dum la venontaj monatoj venos ankaŭ pliaj ŝanĝoj, interalie en reorganizado kaj plifortigo de la Centra Oficejo kaj rilataj instancoj. Dum la pasintaj du jaroj ni jam faris kelkajn paŝojn tiudirekten, precipe per fondiĝo de la Volontula Servo. Ni povas antaŭvidi la formalan starigon de nova, aparta fako pri informado kaj esplorado dum

la venon. monatoj, la eldonon de nova libroisto kaj aliajn elpaŝojn de la Libroservo, kaj signifajn rezultojn de la laboro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, kies plifortigita kaj modernigita revuo komencos aperi sub nova vesto ekde la Nova Jaro.

Tiu eksvingo de agado ĉe UEA stimulas kaj spegulas rimarkindan plivigliĝon sur aliaj terenoj en kaj ekster la Asocio. La eldona agado, ekzemple, precipe pro signifaj kontribuoj el Britujo, Danlando kaj Japanujo, montras refortiĝon kaj novan vervon. Niaj kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj denove allogas la esperantistojn en kreskantaj nombroj. La kuraĝigaj aligociferoj por Rejkjaviko estas nur unu atesto pri tio — kaj la impona nombro da aliĝintoj al la pasintjara TEJO-kongreso memorigas nin, ke precipe la junularo montras novajn fortojn. Ankaŭ la kampo de fakula interesiĝo pri Esperanto konstante firmiĝas — ne nur en Paderborn aŭ Budapeŝto aŭ La Caux-de-Fonds, sed ankaŭ en novaj lokoj kaj ĉe novaj homoj.

Estas bela periodo por labori por Esperanto. Kvankam la publiko restas skeptika, fermita en la propraj intereso, ĉi tiu al la propra prospero — iom post iom, malrapide, sed senteble, ni lernas kiel alpaŝi ĝin kaj kiel disciplini nin mem en la intereso de la pli granda idealo. Ĉefe ni ankoraŭ devas lerni kiel konvinki la publikon pri la graveco de la lingva demando — pri la danĝeroj de lingva superregado kaj lingva diskriminacio, pri la kostoj de la lingva diverseco, pri la neceso de tutmonda komunikilo — kaj en tiun kuntekston injekti la ideon de la Internacia Lingvo Esperanto, nura praktika solvo de la tutmonda lingva problemo. Por atingi tion, necesas rapide plifortigi precipe nian informadon kaj niajn eksterajn rilatojn ĝenerale. Necesas ankaŭ daŭrigi la utiligon de la Volon-

tula Servo kaj persvadi al niaj membroj dediĉi sin intense al Esperanto pere de tiu servo dum periodoj de ses monatoj, naŭ monatoj, unu jaro.

Aparte gravas, ke niaj aktivuloj kaj tiuj, kiuj ŝatus fariĝi aktivaj, venu al la 62-a Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko. Islando ne estas nur interesega kaj unika lando (kiu meritas viziton eĉ nur pro tio), sed ĝi ankaŭ estos la loko, kie ni fiksis nian agadon por la venontaj jaroj, elektos novan Estraron kaj pridiskutos demandojn signifajn, precipe por la eksteraj rilatoj kaj estonta sukcesigo de Esperanto.

La jaro 1977 portos nin al punktonurdekjarojn for de la unua jarcento de la Internacia Lingvo. Ĉu tiu dekjara periodo kondukos nin al la sojlo de sukcesigo de la heredaĵo de Zamenhof? Tio dependos grandparte de nia kapablo je sagaco, sindediĉo kaj efika laboro. La jaro 1977, la komenca punkto de tiu eventuale decida jardeko, alportu diligenton kaj laboron, sagacon kaj klarvidon, feliĉon kaj finan sukceson al ĉiuj laborantoj por la Internacia Lingvo. En la nomo de la Estraro de UEA kaj ĉiuj aliaj aktivuloj en ties organiza strukturo mi deziras al vi pacan kaj prcsperan jaron 1977!

Humphrey TONKIN



IVAN MATEV

Ivan Matev estas naskita en 1903 jaro en urbo Gabrovo.

De sia patro, eta metiisto, li heredis modestecon, laboremon kaj estimon al la laborhomoj, kiujn ecojn li konservis por ĉiam.

Fininte gimnazion, li komencis ierni fervore Esperanton aŭtodidakte. Samtempe la sciama junulo ŝatis legi literaturon de progresemaj verkistoj. Lin ankaŭ okupis politikaj problemoj. Tre simpatianta al la laborpopolo, Matev estiĝis adepto de la socialismaj ideoj, por kies venko li laboris kaj batalis ĝis la fino de sia vivo.

Ĉar pro siaj ideoj li ne havis ŝancon ricevi laboron en sia naskiĝurbo, li sin direktis suden, al Rcdopi-montaro, kaj tie, en la apudlima regiono de urbo Ivajlovgrad, sukcesis ricevi lokon de instruisto.

Penetrita de proleta internaciismo, Ivan aliĝis (1924 j.) al la progresema en tiu tempo E-organizaĵo „Sennacieca Asocio Tutmonda“ (SAT) kaj abonis

ĝiajn pericdaĵojn „Sen naciulo“ kaj „Sennacieca Revuo“. En „Sennaciulo“ aperis kelkaj liaj korespondaĵoj kontraŭ la furioza faŝisma diktaturo en nia lando (1923—1925 j.).

Matev komencis korespondi kun esperantistoj el diversaj landoj de la mondo kaj la ricevitajn leterojn, fotojn, bildkartojn k. a. lerte uzis por propagandi Esperanton. Tiumaniere li sukcese varbis adeptojn de Esperanto, inter kiuj ankaŭ mi estis.

En amika rondo, responde al nia deziro, li verve deklamis kaj kantis esperante por demonstri la belsonecon de la Internacia Lingvo.

En 1926 j. Ivan elmigris al Francio (urbo Lion), kie, helpe de tieaj esperantistoj, sukcesis dungigi sin en aŭtomobila uzino, en kiu laboris du jarojn kiel seruristo. Samtempe li partoprenis la francan laboristan E-movadon en la urbo. Interalie li prelegis kontraŭ la sanga faŝisma reĝimo en Bulgario, konigante ankaŭ la kontraŭfaŝisman movadon en nia lando.



Reveninte en Gabrovo-n, Matev sin fordonis al la serurista profesio kaj al la E-movado.



Speciale notinda estas lia agado dum la periodo de la kontraŭfaŝisma rezist-movado en la regiono de Gabrovo (1941—1944). Tiutempe Matev ligiĝas

kun partizanoj. Komisiite de la partia organizaĵo li komencis kolekti inter la progresmaj metiistoj monon kaj aliajn rimedojn por subteno de la partizana taĉmento de Gabrovo. Venkante multe da obstakloj, li sukcese plenumis la taskon kaj regule transdonadis al la taĉmento la kolektitajn sumojn kaj materialojn.

Ĉe la organizado de eksterleĝa komitato de Patrolanda Fronto en Gabrovo oni komisiis al Matev la funkcion de propagandisto. Tia li restis ĝis la tago de la liberigo — la naŭa de septembro 1944 kaj iom poste.

Sed li ne ĝuis longe la liberan vivon, por kiu tiel sindone batalis. Je la 29 de majo 1946 la esperantistoj de Gabrovo estis profunde ĉagrenitaj pro la frua forpaso de la fervora esperantisto kaj komunisto Ivan Matev.

Ĉiam modesta, diligenta homo kaj sindona socia aganto li lasis imitindan ekzemplon por ĉiuj, kiuj lin konis.

Kostadin Kolev

ORGANIZA VIVO

METODIKA E-SEMINARIO

Fine de novembro okazis dutaga metodika E-seminario en u. Măgliș, organizita de la Distrikta Estraro de BEA en Stara Zagora kaj la loka E-societo «Septembra Ribelo». Partoprenis 26 kursgvidantoj el la urboj Stara Zagora, Ĉirpan, Kozanlâk, Gălăbovo, Măgliș kaj el la vilaĝoj Șipka kaj Enina.

Gvidanto de la seminario estis Violin Oljanov — konata E-lektoro kaj aŭtoro de E-libro por la II grado.

La unuan tagon la lekcionoj okazis en la Kulturdomo de la urbo. Post tio — promenado tra la montera ĉirkaŭaĵo kaj noktado en la Monaĥejo de Măgliș.

La duan tagon la lekcionoj okazis en la monaĥejo mem, en la ejo, kie iam, en la otomana jugo, funkciis ĉela lernejo. Oljanov lerte klarigis al la kursgvidantoj, kiamaniere oni devas uzi lian lernolibron por la II grado kaj ĝenerale, kiel plialtigi la nivelon de sia instrulaboro. Fine de la seminario Slavi Janulov — respondeculo pri la kursa laboro de la Distrikta Estraro, dankis al Oljanov pro la bona laboro kaj al Stefana Bakalova kaj Ivan Lesev

el s-to «Septembra Ribelo», kiuj multe klopodis por la bona organizo de la seminario. Apartan dankon oni esprimis al la monaĥeja estraro, kiu rilatis tiel pozitive al la E-afero kaj reale helpis la seminarion. Estas no'inde, ke du el la monaĥinoj komencis lerni Esperanton ekde kelka tempo.

Estas rekomendinde al ĉiuj distriktaj estraroj en la lando organizi similajn metodikajn seminarion — ili estas ege necesaj kaj utilaj por ĉiufanka plibonigo de nia instrulaboro.

*Stefana Bakalova,
Ivan Decev*

Instruado de Esperanto en Măgliș

Dum la kuranta lernojaro en la distrikto Stara Zagora oni ekkondukis fakultativan instruadon de Esperanto en du triajn klasojn de fundamenta lernejo «Hristo Botev» en u. Măgliș. La instruadon gvidas la entuziasma esperantistino inĝ. Svoboda Damjanova el Kozanlâk.

En la urbo funkcias ankoraŭ du kursoj — por komencantoj kaj progresintoj, gvidataj same de inĝ. Damjanova. Por fari sian respondecan laboron ŝi devas ve'uri, perdi multan tempon kaj fortojn, sed ŝi oferprete plenumas sian E-devon.

St. Bakalova

Nedjalko Jordanov

KOMUNISTOJ

Mi serĉas vin
en la malnovaj portretoj,
en la malnovaj folioj,
kie vi skribis viajn
leterojn antaŭmortajn.
Mi volas penetri
en viajn verajn pensojn
dum tiu lasta momento
sur nia tero granda.

Malsupre
en la korto
la pendigilo grincas de l'vento,
kiel sur balancilo
balanciĝas la morto.
Jen,
post nelonge
malfermiĝos la pordo.
Fino de l'revoj.
De l'vortoj.
Fino de l'mondo.
Ĉu fino?
Vi ne vidis finon,
sed komencon —
jen la granda senco de via
vojo.

Oni piedpuŝas la keston,
balanciĝas la juna korpo.
Morto!
Tamen morto ne por vi,
sed por via morto.
Morton al la morto!
Kaj vivas vi — vivaj kaj vivaj,
tiel vivaj — pli vivaj
ol mi mem eĉ,
kiel helaj grajnoj,
semitaj en la malhelaj kampoj,
flagetoj
de nevelkantaj ĝermoj
en nia tag'.

Ne en muzeoj,
en fotoj,
en leteroj,
kaj folioj —
vi estas en mi
kaj en ĉi,
kaj en li,
kaj en ni —
en niaj pensoj ni sentas
pensojn viajn,
en niaj vortoj ni sentas
voĉon vian.
Morton al la morto!
Mortis nur via korpo.
Kaj reviviĝis
via pura revo,
por resti en ni ĉiam tiel
konstanta,
dum ni spiras,
dum ni estas
en la mondo.

El la bulgara: Lili Koleva

Asen Linov

MIA KANTO

Mia kanto, batafa kanto,
de mia koro inspiranto.
Mia kanto, ribela kanto,
de miaj venkoj gvidanto.

Mia kanto, amata kanto,
mia kunvojaĝanto,
mia obstina sorto
ĝis mia morto.

Nevena Nedelĉeva

FLOROJ DE LA AMIKECO

La ŝargaŭtomobilo subite haltis. En
tiu ĉi tago nia grupo ne havis bon-
ŝancon. Unue pneŭmatiko krevis, kaj
ni devis atendi, dum oni ĝin ansta-
taŭis, duan fojon oni devis ripari relaj-
son, kaj nun ni aŭdis la ŝoforon ĝeme
eliri el la budo kaj diri:

— Kamaradoj, la dinamo ne funk-

cias. Vi mem vidis, ke duonhoron ni
penadis kun malfortaj lumjetiloj. Fine
la dinamo tute rifuzis. . .

— Kaj nun? — ekkriis kelkaj el
la virinoj.

— Nun ni eliros, — diris la gvi-
danto de la grupo.

Ni ĉirkaŭis la ŝoforon. Estis neeble



n la malluma nokto ripari la difekton. Ni troviĝis meze de monto. Iuj komencis ĉirkaŭrigardi pri vilaĝo, kien ni povus rifuĝi. Feliĉe, preterpasis aŭto kaj oni diris al ni, ke post la sekva vojkurbiĝo estas vilaĝeto.

Ni ekiris. La luno montriĝis granda, solena kaj lumigis Rodo i-montaron. Mi estis surprizita, ke tiuflanke la monto ne estas kovrita de arbaroj, kaj oni povas vidi ĉiujn ĉirkaŭajn montokrestojn kaj pintojn.

La humoro pliboniĝis. Iuj ekkantis. Kelkaj dormemaj infanoj vigliĝis pro la freŝa montaero kaj saltetis ĉirkaŭ siaj gepatroj.

Ni pasis vojkurbiĝon, pasis duan kaj apenaŭ ĉe la tria eklumis kelkaj domoj. Pli supre, sur la montodeklivo, lumis ankoraŭ kelkaj domgrupetoj.

Ni aliris la plej proksiman domon, frapis sur la pordo. Eliris grandaĝa viro. Li diris, ke en lia domo ne estas loko por noktado. Nur en la lernejo ni povus tranokti.

— Kaj ĉu ĝi estas nun malfermita? — demandis la gvidanto de la grupo.

— La maljuna instruisto estas ĉiam tie. . . Nur atentu por ne piedpremi liajn florojn.

Oni ne turnis atenton al lia rimarkigo. Iu demandis, kiel ni povas trovi la lernejon.

— Mi kunsendos la knabon por konduki vin, — diris la viro kaj malferminte la pordon, vokis iun laŭ nomo.

Ne pasis minuto kaj aperis 12—13-jara knabo. La grupo ekiris post lin.

Ni komencis supreniri ŝtonhavan, ne pavimitan vojon. Ankaŭ la knabo avertis nin esti atentaj, paŝi nur sur la vojeto, ne piedpremi la herbon kaj la florojn.

— Bone, bone, — respondis mekanike kelkaj voĉoj.

— Atendu tie ĉi, — diris la knabo, kiam ni atingis grandan pordon, evidente trans ĝi estis la lerneja korto, — Mi iros voki la instruiston.

Baldaŭ ĉe la pordo, sub la luna lumo montriĝis alta, blankhara homo kaj invitis nin eniri.

— Geamikoj, ne forgesu paŝi nur sur la vojeto, — atentigis nin ankaŭ nia grupestro.

Iuj ekridis por momento. Baldaŭ ni troviĝis sur vasta placo, kovrita per ŝtonplatoj. Antaŭ ni staris bela, granda lernejo, duetaĝa. Nin ĉirkaŭblovis aromo de florantaj plantoj.

La maljuna instruisto malŝlosis la pordon de la lernejo, sed al mi faris impreson, ke tiuj, kiuj jam staris ĉe la pordo, ne eniras. Kio okazis? Mi proksimiĝis kaj komprenis la aferon. Neniu kuraĝis eniri kun siaj polvo-havaj ŝuoj, ĉar la tuta koridoro estis kovrita per blankaj, hejme teksitaj tapiŝoj.

Do ni lavis nin kaj nur tiam eniris en purajn, grandajn klasĉambrojn. La knabo alportis al ni blankajn matojn, sur kiuj ni ekuŝis, dankante la maljunan instruiston kaj la serveman knabon. Ni estis tre lacaj. Ĝis la tagmezo ni estis laborintaj kaj poste tuj ni eniris la ŝarĝaŭtomobilon por fari la projektitan ekskurson, tial la ripozo estis al ni dolĉa.

Ekdormante, mi ankoraŭ aŭdis komentojn de surprizo pro la pureco de tiu ĉi lernejo.

Sed la surprizo, kiu nin atendis la sekvan matenon, estis tia, ke la impresoj pri la lernejo, ricevitaj la vesperon, paliĝis.

Kiam mi eliris, kune kun la matena freŝa aero min alblovis aromo de multaj floroj. Ekstarinte sur la ŝtuparo, mi mirkonsternite rigardis la grandan florgardenon post la ŝtonkovrita teraso laŭlonge de la tuta lerneja konstruaĵo. Plue sekvis fruktĝardeno.

Mi rigardis al la nudaj montokrestoj, lumigitaj de la unuaj sunradioj, kaj denove mallevis rigardon al tiu ĉi paradizo, en kiu ni troviĝis. Kiu estis kreinta ĝin?

Dume sur unu el la aleoj de la florgardeno mi rimarkis la maljunan instruiston haltintan ĉe grenate ruĝaj rozoj. Per rapidaj paŝoj mi direktiĝis al li kaj demandis:

— Ĉu vi kreis tiun ĉi miraklon?

La blankhara kapo leviĝis, kaj min ekrigardis du bluaj okuloj, serenaj kiel la mateno mem. La maljuna homo ridetis kaj diris:

— Ne mi, sed unu ideo.

— Ideo? — mi miris.

— Jes, jes, — li balancis la kapon, rigardante min per penetranta maljunula rigardo.

Poste sur lia tuta vizaĝo ekludis rideto, kaj liaj lipoj flustris:

— Kiel strange!

Mi konfuziĝis kaj demandis:

— Kio estas stranga?

— Ke vi tiel similas iun estaĵon kiun mi renkontis antaŭ tre, tre longa tempo, — li mallaŭte respondis, kaj liaj bluaj okuloj kvazaŭ lumiĝis de nevidebla suno.

Post kelka tempo ankaŭ miaj gekolegoj eliris el la ĉambro. Ili ĉiuj ne povis trovi vortojn por esprimi sian admiron. Neniam oni povis supozi, ke en tiu ĉi loko povus ekzisti tiaj floroj.

— Kiel kaj de kie vi havigis al vi tiujn mirindajn florojn? — unu el la koleginoj sin turnis al la maljuna instruisto.

— Tio estas enigmo! — ridetis la bluaj okuloj. — Divenu ĝin!

— Mi tute ne povas kompreni, — levis ŝultrojn la kolegino.

— Sed mi povas malkovri la enigmon, — diris la gvidanto, kombante sian malsekan, ĵus lavitan hararon.

La maljuna instruisto sin turnis al li, kaj lia vizaĝo ekbrilis varme. „De kie tiu ĉi eksterordinara simpatio al li?“ — pasis muta demando sur ĉies vizaĝoj. Sed neniu diris ion ajn, atendante aŭdi la sekreton de la floroj, evidente alportitaj el malproksimaj lokoj. La gvidanto komprenis nian atendon kaj diris:

— Nia afabla dommastro estas esperantisto, kiel mi. Jam hieraŭ vespere ni ekkonis unu la alian, kaj tial mi restis dormi en lia ĉambro.

— Kio sekvas el tio? — iel malravite sin aŭdigis samtempe kelkaj koleginoj.

— Se vi ne povas kompreni, kion fari? — levis la ŝultrojn nia gvidanto.

— Do klarigu home, por ke ĉiuj komprenu, — iom ofendite diris lia edzino.

— Nun mi klarigos al vi la tutan aferon, — ekparolis la maljuna instruisto. — Tiuj ĉi floroj estas floroj de la amikeco. . . Ili estas senditaj al mi el diversaj landoj. Kaj ĉiu el ili estas esprimo de amikeco kun tiu, kiu sendis ĝin.

— Kiel bone! — mi diris. — Floroj de amikeco!

— Jes, jes, — li konfirmis, kaj mi vidis, ke lia rigardo longe restis sur mi.

Poste la maljunulo ridetis iel strange kaj ekparolis plue:

— Jen, tiuj blankaj, — li montris tutan bedon de etaj blankaj floretoj, — estas el Danlando. Kun tiu lando min ligas kvardekjara amikeco.

En la okuloj de ĉiuj mi rimarkis rideton kaj miron.

— La plej interesa nun estas tio, ke jen tiu ĉi junulino, — li montris min, — tute similas al mia korespondantino, kiam ŝi havis la saman aĝon. . . kiam mi vidis ŝin en Danlando.

— Do vi vizitis Danlandon? — demandis tute juna kolegino.

— Jes, antaŭ tridek jaroj. Kompreneble, tiam mi estis juna, kvindekjara kaj mi povis vojaĝi.

La junaj gekolegoj ekridis. La nombro, montrita kiel karakteriza por juneco, verŝajne signifis por ili jam maljunecon. Sed iu grandaĝa kolegino sin aŭdigis:

— Kial vi ridas? Tiam la viro estas juna.

La junuloj glutis la ridon kaj direktis seriozan rigardon al la dommastro.

— Kaj kiomaĝa ŝi estis? — iu demandis.

— Tridekjara. Sed tio vere ne gravas. Ĝis nun ni korespondas kun ne malpli da amika sento. Tiam en Danlando okazis tiel, ke mi malsaniĝis. . . kaj tre grave. Ŝi restis konstante ĉe mia lito ĝis mia resaniĝo. Malgraŭ

Denove en la abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto“ por 1977 jaro distingiĝis nia fervora samideano DIMITRO IVANOV el Plovdiv. Li kolektis 121 abonojn!

Sekvu lian noblan ekzemplon! Varbu novajn abonantojn! Ni nepre atingu 6100!

ke ŝi mem estis patrino, havis infanojn. . . Tiam mi vidis praktike realiĝi la amikeco inter diversnacioj. . .

— Kaj tiuj ĉi rampantaj blankaj rozoj, — la maljuna viro plue parolis, — estas senditaj al mi de japana amiko. Ankaŭ kun li min ligas multjara amikeco. Post la dua mondmilito, kiam li aŭdigis sin, kaj mi komprenis, ke li estas viva kaj sana, mi ĝojegis kaj sendis al li tion, kion mi hazarde havis en la momento. Responde mi ricevis de li tian leteron, kiam mi ne ricevis de mia sangofrato. Kaj post kelka tempo mi estis surprizita de la rozoj, kiujn li sendis al mi. Kian ĝojon mi travivis tiam, mi ne povas esprimi:

La maljuna instruisto eksilentis. Ni estis retenintaj la spiradon. Post kelkaj minutoj li ekparolis denove:

— Mi havas bedojn de tulipoj, senditaj el Nederlando. Longe ni korespondis kun mia amiko. Multfoje mi rakontis al li pri la montaro, kie mi loĝas. Kiam ni komencis la korespondadon, li estis lernanto. . . Li ne havis patron. Tio ankoraŭ pli forte ligis min al li. Fininte sian studadon, la junulo estiĝis inĝeniero. Antaŭ kvin jaroj li trovis min tie ĉi. Mi premis lin al mia brusto kiel mian propran filon. . . Kaj li ridis kaj ĝojis kiel knabo. Tiam li alportis al mi bulbojn de tulipoj. Pasintjare, kiam mi tute ne atendis lin, li denove venis. „Por vidi la tulipojn, — li diris, — kaj mian maljunan patron. . .“ Kaj mia koro plenkleniĝis de ĝojo.

— Jen tiuj dalioj estas el Pollando. Mi iam korespondis kun la patro de la knabino, kiu sendis ilin al mi. . . Dum

la milito la leteroj ĉesis. Kiam venis la paco, mi sendis al li leteron. Sed al mi respondis lia deknaŭjara knabino — la patro pereis en faŝista koncentrejo. De tiam mi senĉese interesiĝas pri la sorto de tiu ĉi infano. Pro amo al sia patro ankaŭ ŝi lernis Esperanton kaj. . . sendis al mi liajn amatajn florojn. Ŝi jam edziniĝis. Tiun ĉi someron mi atendas ŝin kun la tuta familio. Ili iros al la Nigra Maro kaj poste venos por gasti ĉe mi kelkan tempon. Jen, ĉu vi vidas, — la maljuna instruisto ridetis, — kiom granda estas mia internacia familio, ĝiaj membroj loĝas en diversaj landoj, sur la tuta tero.

— Do tial vi estas svelta kiel poplo kaj vi vivos cent dudek jarojn, — ĉirkaŭprenis liajn ŝultrojn nia gvidanto.

— Mi plene konsentas! — gaje respondis la maljuna instruisto kaj kun patra korvarmo ekrigardis lin.

Mi tute ne bedaŭris, kaj mi supozas, ke ankaŭ neniu el nia kompanio bedaŭris, ke la riparita ŝarĝaŭtomobilo venis por ni apenaŭ posttagmeze.

Sed antaŭ ol ni ekiris, la maljuna instruisto metis manon sur mian ŝultro kaj mallaŭte demandis:

— Ĉu vi lernas Esperanton?

— Ne. . . Sed ĉi-aŭtune mi nepre komencos. . . Ĉio tie ĉi tiom multe plaĉis al mi. . . Kaj mi nepre sendos al vi leteron.

— Bone. Mi vidos, kion vi lernos.

Kiam la ŝarĝaŭto ekiris, mi estis certa, ke ĉiu el ni kunportas por ĉiam rememoron pri tiu mirakla ĝardeno kun floroj de la amikeco kaj pri la rava maljuna instruisto-esperantisto.

El letero de rumana esperantisto

E-AKTIVECO EN BRAȘOV

En Brașov, kien mi translokiĝis kun mia tuta familio antaŭ pli ol unu jaro, mi verĉis s-anon I. Sirbu. Liaj spertoj kaj mia juneco faris bonan skolon. Ni multe strebis por fondi E-klubon kaj fine ni sukcesis. Je la fino de marto 1976 ni fondis E-klubon kun 21 membroj enkadre de la Domo por Tekniko kaj Scienco por la Junularo, kie nun mi laboras kiel ĉefa kultura instruکتro. En la dua kunveno ni iniciatis preparon de kultura programo, kiu estis prezentita la 3-an de julio lige kun la fermo de mia E-kurso. La gekursanoj kantis, deklamis. Estis amuza praktika leciono, ludis orkestro. La programo plene sukcesis kaj bone propagandis Esperanton. Dum la tuta tempo nin helpis aktoro de la loka dramteatro.

Ni scias, ke tio estas nur la komenco, sed ni estas pretaj sindone labori plu.

Nun ni zorgas pri malfermo de novaj kursoj, komparas E-lernolibron por niaj kursanoj. Ĝi jam estas duonpreta. Ĝi certe ne estos la plej bona, sed por ni ĝi estos la unua, ĉar alia nuntempe ĉe ni ne ekzistas.

Mi ege bedaŭras, ĉar mi ne povis partopreni vian imponan E-kongreson en Ruse. Sed la Universalan Kongreson en Varna certe!

Sincere via

Trifoi Mihai

EL LA AGADO DE LATVAJ ESPERANTISTOJ

La 16-an de oktobro okazis tradicia renkontiĝo de du junularaj E-klubo — el Riga kaj Talin (Tallinn), kiuj regule ĉiujare interŝanĝas vizitojn. Ĉi-foje Taliron vizitis 12-persona grupo el la Junulara E-Klubo de Riga. La alveturantojn jam en la fervoja stacidomo gastame atendis reprezentantoj de Talina E-Klubo sub la gvido de August Kilk kaj Einer Meister. La estonaj samideanoj konatigis nin kun la plej interesaj lokoj en sia antikva ĉefurbo.

Poste en la E-klubejo estis organizita seminario, kiun partoprenis ankaŭ la gvidantoj de la E-movado en Estonio J. Ojalo, H. Pill, Kruusalu kaj aliaj eminentaj esperantistoj. Ili rakontis al ni pri sia klubo kaj ĝia agado, pri la E-instruado en lernejoj, pri la vigla eldonagado ka. Rakonton pri la Talina E-klubo faris J. Ojalo, pri la junulara sekcio — E. Meister, el Latvio reciprokis la prezidanto de la E-klubo en Riga T. Bercis kaj la respondeculo pri la propaganda fakto A. Medinš.

Post la oficiala parto okazis vespero plena je prezentaĵoj, kantoj, ludoj kaj dancoj. La renkontiĝo estis tre interesa kaj fruktodona por ambaŭ kluboj.

«Skola un ĝimene» («Lernejo kaj familio») — organo de la latva Ministerio de Kulturo (eldonkvanto 44 000), publikigis artikolon de la latva poeto kaj esperantisto Harijs Skuja «Esperanto eltenis la ekzamenon de la tempo» kaj tri tradukitajn de li poeziaĵojn (aŭtoroj — la E-poetinoj Lina Gabrielli kaj Elvira Lippe). La artikolo konigas al la neesperantista leganto la bazajn faktojn pri Esperanto, skizas la faritan labron de fervoraj E-agantoj en Latvio, rakontas pri la originala E-literaturo kaj la nuna stato de la lingvo.

T. Bercis

Esperanto-lernejo — BRATISLAVAJ MAJOJ 1977

1–29 de majo

En nia E-lernejo funkcios duspecaj grupoj:

a. Unusemajnaj (1–8, 8–15, 15–22, 22–29 de majo)

b. Dusemajnaj (1–15 kaj 15–29 de majo)

Loĝado: turista, en 4-litaj kabanetoj kun elektra hejtado.

Instruado: 4 horojn ĉiutage en kursoj A — por komencantoj, B — konversacia, C — por progresintoj, R — refreŝiga. Infanoj 4–7-jaraj (kun gepatroj) — en aparta grupo.

Turismo: vizitado de kulturmonumentoj, muzeoj, ekskurso al la fama banloko Pieštani (aparte agenda).

Kotizoj: por unusemajna grupo — 720 ĉs kronoj, por dusemajna — 1400.

Aparte konsiderinda estas la ebleco trafi la tagojn de la kongreso de Asocio de Slovakaj Esperantistoj (6–9 de majo).

Vi povas pagi ankaŭ ĉe via alveno en Bratislavo, se nur via aliĝilo estus subskribita de delegito de UEA aŭ de la estraro de via E-societo.

Limdato de aliĝo: laŭeble ĝis la fino de februaro.

Adreso: ĈSSR, 80 100 Bratislava, Esperanto-rondo „La vojo“, Plzenská 7.



● La redakcio de „Heroldo“ proponis antaŭ kelkaj monatoj al la estraro de Instituto Hodler interkonsenton, kiu havigu 150 lernolibrojn „Paŝoj al plena posedo“ de W. Auld al Esperanto-lernantoj en Azio, Afriko kaj Suda Ameriko. La estraro de Instituto Hodler disponigis 1000 guldenojn per pagi la kostojn de la libroj kaj la sendkostojn.

● Internacia ĵurio (R. Bernard, C. Conterno, A. Fighiera-Sikorska, D. B. Gregor kaj E. Lappenna) proklamis la skotan poeton Albert Goodheir „Aŭtoro de la jaro 1975“ en tiurilata konkurso de la literatura rondo „La Paŝo“. La diŝtingon al Goodheir portis i. a. la originala poemaro „Merlo sur menhiro“ kaj la tradukoj de „Bakchantinoj“ (Eŭripido) kaj „Forkaptita“ (R. L. Stevenson).

● La Someraj Universitataj Kursoj 1976 okazis de 8—29. 8. 1976 en salonoj de la Universitata Instituto de Antwerpen, Belgio. Partoprenis pli ol 50 personoj el 12 diversaj landoj. La tri studfakoj estis: biologio, matematiko kaj sociologio.

● „O trava 76“. Dum la tagoj 4—19. 9. 1976 en O trava, ĈSSR, estis aranĝita interŝtata ekspozicio de poŝtmarkoj „O trava 76“. Enkadre de la ekspozicio okazis la 6-a renkontiĝo de la E-ekcio, laboranta enkadre de la Federacio de ĉeĥoslovakaj filatelitoj, kaj renkontiĝo de la pola kaj ĉeĥoslovaka E-ekcioj. En la ekspozicia katalogo oni publikigis kelkpaĝan artikolon de la prezidanto de la ĉeĥoslovaka E-ekcio Vláda Hala. En la ekspozicio oni prezentis 7 kolektojn je la temo Esperanto.

● La Asocio pri Internaciaj Studoj, grava usona faka organizaĵo, pritraktos dum sia konferenco en marto 1977 interalie la temon „Lingvaj baroj kiel monda politika institucio: Kiu komunikas kion, kiam, kiel?“ La tiute-

man sesio prezidos prof. d-ro Jonathan Pool — aganta direktoro de CED kaj komitatano de UEA. La podian diŝtaton partoprenos i. a. pluraj konataj universitatanoj-esperantistoj.

● En la skizo de la nova programo de la dana Progres-partio troviĝas rekomendo, ke ĉiuj infanoj en la mondo estu kapabligitaj paroli kaj skribi en Esperanto ekde sia 12-jara aĝo.

● Post unua kunveno en Damaskus s-ro T. Mawsily intencas fondi „Arabian Sirian Esperanto-Asocion“. Tiucele la iniciatinto petas sendi informilojn, revuojn, lernilojn ktp. Adreso: T. Mawsily, 7 Mawsily & Dalaty Bldg., St. Al. Malab, Nazrahi, Damaskus. S. A. R.

● En oktobro en sep britaj universitataj radiostacioj komenciĝis la serio de Esperanto-lecionoj „Jen nia mondo“. Oni ankaŭ antaŭvidas lernejan eldonon de la kurso. Inf.: Group Five, 140 Brookfield Road, GB Bedford, Britujo.

● En urbo Medellin, Kolombio, oni organizis E-kurson per radioamatoroj kaj fondiĝis Esperantan Radio-klubon. Adreso: Radio-Klubo Antiokia, Edif. Camacol of. 1301, Calle 49-b, n-ro 63-21, Medellin, Kolombio.

● Parto de la Tea'ro Esperanto de Paris partoprenis la ĉiujaran nacian junularan konkurson en Versaj (Versailles). Oni prezentis tradukaĵon de „Andromako“ de Jean Racine kaj gajnis premion, pruvante, ke Esperanto estas vere vivanta lingvo, en kiu oni povas esprimi ĉiujn sentojn.

● Novaj Esperanto-tratoj kaj placoj. En 1976 estis nomitaj: strato „Esperanto“ — en u. Valls, Hispanio (Katalonujo), kaj Esperantoplaco (Esperanto-ter) en u. Komilo, Hungario.

El „Informio“ de Internacia E-Muzeo en Vieno, n-ro 4/1976

„Por la paco“ XII

Aperis „Por la paco“ № 12, ofseta, formata 14×20, 48-paĝa, ilustrita, eldonaĵo de Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj, Moskvo 1976. La kajeron preparis E. Salnikov kaj V. Samodaj. Adreso de la Komisiono: Moskvo, K — 9, prospekt Kalinina 14.

En Moskvo subite forpasis

prof. d-ro D. L. ARMAND

(1905—1976)

Li estis d-ro de geografia, eminenta sciencisto kaj fervora esperantis-o-veterano. La hela memoro pri li res'os ĉiam en la koroj de la esperantis-oj ĉiutage!

Lige kun lia forpaso ni aperigas la apudan artikolon.

ENTUZIASMO „EKDE INFANAĜO“

Profesoro doktoro pri geografiaj sciencoj D. L. Armand estas aŭtoro de la interesa libro „Por ni kaj por la nepoj“, kiu ricevis unuan premion en la Tutsovetia Konkurso de Sciencopopulara Literaturo. Prof. Armand estas entuziasmulo pri Esperanto, ties veterano kaj fakulo, partopreninto de UK de Esperanto en Sofio kaj Helsinko kaj la Eŭropan E-Konferencon en Vieno (1965).

„Ĉiuj niaj pasioj originas de infanaĝo“ Armand ekokupiĝis pri la Internacia Lingvo en 1922 j. en la 7-a klaso de lernejo, kie la fremdlingvojn instruis la fama esperantistino A. N. Šarapova. Sub ŝia influo preskaŭ ĉiuj lernantoj ekamis forte Esperanton. Interesa momento en la vivo de la lernejo estis la alveno de la fama lerninto de Šarapova, la blinda es-

perantisto-poeto Vasilij Jeroŝenko. Persvadis la junan Armand la rakontoj pri daŭraj vojaĝoj en eksterlando.

D. L. Armand laboris dum ekspedicioj sur duoninsulo Kola, en la Mezrusia Altaĵo en Ukrainio, en Mezaŭio, eksterlande ktp. Kaj ĉie, paralele kun la scienca laboro, li serĉis kontaktojn kun esperantistoj. Antaŭ multaj jaroj, veturante en ekspedicio tra la provincoj de Ĉinio pli ol 35 000 km, li eksciis, ke la interpretis'o-ĉino, laboranta en la sama grupo, parolas Esperanton. Tiu interpretisto ligis la profesoron de geografio kun esperantistoj el la Pekina E-klubo. Pro la renkontiĝoj kaj diskutoj kun redaktoroj — homoj de plej diversaj profesioj kaj okupiĝoj, sed ligitaj per la amo al Esperanto, Armand ekkonis en nova lumo la landon de plej komplika lingvo en la mondo.

Esperanto helpis la profesoron en la scienca laboro, precipe dum ekspedicioj tra diversaj landoj.

La veterano de Esperanto konatiĝis kun kolegoj-geografoj — prof. Miltcrini (Italio), Marinov (Bulgario), Jerar (Francio), Mabajune (Brazilo), interŝanĝadis librojn, artikolojn kaj. Li ricevis multe da valcraj sciencaj informoj, precipe en Esperanto. Sed li pruntedonis la literaturon al siaj kolegoj, instigis multajn defendi disertaciojn al kandidatiĝo kaj doktoriĝo kaj ĉiam altiris amikojn per la Internacia Lingvo.

«Tiu ĉi reciproka ligiteco ne estas hazarda, —

diras profesoro Armand. — Nun en la mondo aperas ĉ. 100 000 titoloj de sciencoteknikaj periodaĵoj. Oni aperigas ĉirkaŭ tri milionojn da artikoloj. Iuj uscnaj kemiistoj opinias, ke pli facilas inventi teknologiojn pri ellaboro de nova substanco, ol serĉadi en la literaturo, ĉu ĝi jam pli frue ne estas inventita. Tiel statas la afero ne nur en la kemio. Per venki la lingvajn barojn ĉe ni kaj eksterlande nun oni elspezas kolosajn monrimedojn.

Kaj ĉu ne estas paradokso, ke kun la evoluanta sistemo de instruado, kun la pliiĝanta aperigo de vortaroj kaj poliglotaĵoj, komplikigas la vojoj por likvidi la nekomprenadon de lingvoj? La esperantistoj eĉ el plej scraj anguloj de la terglobo tiajn komplikajojn ne konas. . . »

Dum la lastaj dekkvin jaroj la entuziasmoj pri la helplingvo en USSR konsiderinde pliiĝis. Tion akcelas la organizado de E-tendaroj kaj E-renkontiĝoj. D. L. Armand estis en la tendaro ĉe la lago Teleck, en la montaro de la Granda Ĉimĝan, ĉe rivero Dnepro, en Kaŝir kaj aliloke. Li asertas, ke la E-movado havas konsiderindajn perspektivojn. Ĝi nepre okupos dignan lokon en la internacia vivo kaj scienco. Eble ne tre baldaŭ. Sed la «blankajn makulojn» en ĉiuj sferoj de la scioj oni konkeras iom post iom.

J. Gold

J. „Sovetskaja Molodeĵ“, n-ro 160/1974

El la rusa: Teodoro Arbergs

Ni recenzas

LAŬDINDA ENTREPRENO

(Pri „Sciencaj Komunikajoj“)

Dum la lastaj jaroj la interesiĝo pri apliko de Esperanto per sciencaj celoj kreskas. Konsiderinte, ke «se tiu ĉi interesiĝo konkretiĝos en formo de sciencaj eldonaĵoj, kies enhavo kaj aspekto havas similan nivelon al la nacilingvaj, tio certe favore influos la ideon pri la enkonduko de ununura internacia lingvo per la scienco», la Budapeŝta Klubo «Konkordo» per la morala kaj financa apogo de la Budapeŝta Teritoria Komitato de Hungara E-Asocio aperigis en 1975 la unuan kajeron de «Sciencaj Komunikajoj» kiel aldonon al la bulteno „Budapeŝta Informilo». Ĝi enhavis originalajn sciencajn kaj popularsciencajn artikolojn de hungaraj esperantistoj-fakuloj. Tiu eldonaĵo provokis tre favoran ĉion en multaj landoj, kaj la membroj de «Konkordo» decidis prepari duan kajeron, kiu aperis en 1976.

Krom la redakcia artikolo «Historio kaj evoluo de la Budapeŝta Medicina E-Fakgrupo»

kaj tri mallongaj informoj, la dua kajero de «Sciencaj Komunikajoj» entenas artikolojn pri temoj el diversaj fakoj de la scienco. Je iliaj titoloj: «Reprizaj strukturoj en la hungaraj popolkantoj», «Skizo pri la merfeamiko en Esperanto», «Stenografio kaj Esperanto», «La moderna arkeologio; ĝiaj celoj kaj metodoj», «Variĉelo de infancj kuracitaj per kortikesteroidej kaj imun-subpremantaj medikamentoj», «Prizorgado kaj rehabilitado de lernantincj suferantaj je psikovegetativa malsekulaĵo», «Nia vivo kaj la mikrobi», «Kemia ŝanĝigo de atmosfera akvo kaj traintaj arbar-kreskor», «Baŭksito, la dua el la subteraj riĉaĵoj de Hungario», «Teorio de la hidro-elastika simileco kaj ĝia eksperimenta pruvo», «Elementoj de la inĝeniera statiko». Laŭtaroj krom hungaraj, estas 1 sovetiano kaj 1 usnana. Ĉiuj estas sciencistoj kun titoloj de doktoroj aŭ kandidatoj de la respektiva



sciencoj, sciencaj laboristoj, kuracistoj, inĝenieroj ka. Ĉiuj artikoloj estas akompanitaj de fotoj aŭ desegnaĵoj kaj indikoj de la uzitaj fontoj. Kelkaj havas ankaŭ resumojn en la rusa aŭ la angla lingvoj, kiu ebligas utiligon de la artikoloj fare de neesperantistoj.

Ne eblas al unu persono pritaksi la valcon de ĉiuj sciencaj artikoloj, ĉar por tio necesas esti fakulo en pluraj fakoj. Kelkaj estas facile legeblaj kaj komprenablaj ankaŭ de nefakuloj.

El ĉiuj artikoloj apartan intereson por la esperantistoj, precipe por filologoj, prezentas la altnivela scienca artikolo «Skizo pri morfemiko en Esperanto» de d-ro Szerdahelyi Istvan (Szerdahelyi Istvan) — elstara esperantologo, gvidanto de la fakto Esperanto ĉe la Katedro pri Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko, Universitato Eötvös Loránd, Budapeŝto. Sur 14 paĝoj la aŭtoro donas detalan kaj kompletan scienca skizon pri la morfemiko de Esperanto, traktas la etimologion, la semantikon, la tipojn kaj la interkombinigon de la E-morfemoj. Precipe interesa kaj utila estas la ĉapitro pri la kombinologio kaj pli speciale ties parto

pri la derivado de leksemoj (vertoj) pere de la sufikso -ej. Post la artikolo — riĉa bibliografio.

Ni arde rekomendas tiun artikolon al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri esperantologio kaj lingvistiko ĝenerale.

La lingvaĵo de «Sciencaj Komunikadoj» estas perfekta. Ne eblas tamen al ni esprimi opinion pri la korekteco de la faka terminaro.

Oni sci'gs, ke post la dua kajero sekvos tria, titolita «Teknikaj Komunikadoj».

Ni salutas la laŭdindan entreprenon de la hungaraj esperantistoj, kiuj montriĝas pioniroj en tre grava fakto — la apliko de nia lingvo por sciencaj celoj. «Sciencaj Komunikadoj» kune kun la esperantlingva revuo «Scienca Mondo», aperanta ekde 1976, «Scienca Revuo» ka. estas grava kontribuo por la realigo de tiu ĉi granda celo. Ni plenkore deziras sukceson al «Sciencaj Komunikadoj» kaj alvokas la esperantistojn ĉiufanke subteni ilin.

Aĉreso: Budapeŝta Teritoria Komitato de Hungara Esperanto-Asocio, P. F. 153, H-1443 Budapest, Hungario.

Dimitro Haĝiev

Verdaj steletoj

Galina Tiĥaja

PANPECO

La hundo Ŝarik de naskiĝo ne estis enviema kaj ĝojis pri ĉio, kio ŝajnis al li bona.

En serenaj sunaj tagoj la bono fluis el la ĉielo, la bonaj sunradioj varmigis la teron, la herbon kaj la hundobudon, en kiu loĝis Ŝarik. Pli ĝuste dormis...

Ankaŭ la flaketo estis bona. Ĝi donis al Ŝarik akvon.

Bonaj estis la noktoj. Trankvilaj, steloriĉaj, plenigitaj de arĝentaj sonoj de griloj.

Estis multe da bono ĉirkaŭe, ĉion ne eblas kalkuli, sed ekzistas en la vivo ankaŭ malbono, kaj Ŝarik ekkonis ĝin.

Ekkonis ĝin tiam, kiam forveturis la malnova mastro kaj en la domo aperis nova homo — larĝasultra, malserena viro kun nigraj brososimilaj lipharoj kaj en neimageble grandaj botoj.

Kun la viro aperis griza ombrosimila virino kaj knabo kun bukla blonda hararo.

La malserena viro metis sur la kolon de Ŝarik pezan rimennon kaj por la unua fojo dum tuta sia vivo Ŝarik ellernis kalkuli. Li kalkulis, ke de lia budo ĝis la remizo estis kvin paŝoj, sed kalkuli pli malhelpis la ĉeno.

Tio estis la unua malbono en la hunda vivo. Kaj kiel ĉiu malbono, ĝi estis peza, ofenda.

La viro ŝatis bone manĝi, kaj kiam krepusko estis kovranta la teron, la griza virino metadis sur la tablon pladon kun viando. Ŝarik toleris, glutante salivon, sed foje ne eltenis, kaŝis profunde sub la hararo la hundan fieron kaj mallaŭte petis peceton. La mastro kolere ekrigardis la hundon, aliris kaj puŝis piede ĝin rekte en la hundan muzelon.

La malbono bruligis la okulojn de Ŝarik per akra doloro. Aperis deziro kuri tra la legomĝardenoj, tra la pikema densaĵo de kukurboj kaj enfosi



la muzelon en la roskovritan herbon.
Turmentis lin soifo.

Kaj jen pro malsato, jen pro ofendo kaj soifo Ŝarik ekhurletis, ĉirkaŭpreninte la teron per piedoj. La grundo estis varma, kvazaŭ ĝi mem volis trinki, ĝi fide submetis siajn manplatojn al Ŝarik, kaj Ŝarik rimarkis kun teruro, ke li ploras. Li ploris silente, kaj la bona tero ensorbis liajn larmojn, por ke neniu ilin vidu.

Sed juste oni diras, ke post ĉagreno venas ĝojo. Malgranda bono facile tuŝis la densan nukon de Ŝarik. Li tuj komprenis, ke ĝi estas bono, ĉar malbono ne povas esti tia nekuraĝa kaj tenera.

Ŝarik levis la okulojn kaj ekvidis la knabon. Tiu staris surgenu, kaj lia malgranda mano karesis Ŝarikon. Poste la knabo eligis elsub la ĉemizo bonodoran panpecon kaj ŝovis ĝin al Ŝarik. La hundo prenis la panon zorgeme, nur per la lipoj kaj formanĝis ĝin. Li plezure dirus „dankon“ al la bukla knabo, sed li ne povis paroli kaj nur svingis la kapon.

La knabo forkuris kaj baldaŭ aperis kun alia panpeco. Li metis ĝin apud la budo — kaj foriris. Ŝarik bone sciis, ke morgaŭ estos nova tago, kaj ne estis certeco, ĉu venos al li la blondbukla knabo. Pro tio Ŝarik ne manĝis tiun panpecon, sed enfosis ĝin ĉe la budo. Tamen Ŝarik maltrankviliĝis vane. La sekvan matenon alkuris la knabo kaj regalis lin per kuko kun rizo. Kaj fariĝis tiel ĉiutage. . .

Foje el la domo aŭdiĝis laŭtaj krioj. Ŝarik aŭdis la koleran voĉon de la malserena viro, kaj post kelkaj minutoj sur la ĝardenvojeton elkuris la bukla knabo. Li ploris singulte, kaj la malserena viro ion kriis post lin. Ekvidinte Ŝarikon la knabo ĉesis plori kaj enrampis la budon.

— Ili serĉu! — diris li, viŝante la larmojn kaj ĉirkaŭbrakante Ŝarikon. Ŝarik ankaŭ deziris diri „ili serĉu“, ke tie ĉi la knabon neniu ofendos — nek homo, nek hundo. Tamen li ne povis diri tion kaj nur lekis la knabon.


ENIGMO

de Marin Băceș

LA		VA	JA		ES
TU					LI
	POR			HO	
	PO			SUR	
TE					PLE
TA					TO

Pe'ro preparis belajn tabuletojn kaj skribis sur ili silabojn. Poste li ordigis la tabuletojn tiel, ke riceviĝis novj'ra bon'eziro. Sed lia pe'olema frate'ro nevole diĉu'is la tabuletojn, nur kelkaj restis sur sia loko (vidu la unuan figuron).

Bonvolu ordigi la tabuletojn el la ĉuaj figuro sur la malp'entajn lokojn (horizonta'e aŭ vertikala'e) tiel, ke vi ricevu la saman bende-ziron. Se vi sukcesos, la redakcio de „BE“ premios vin per Esperanta libro.



— Vi komprenu, Ŝarik, mi nur deziris rigardi, kio troviĝas interne en la globmapo, mi ne deziris ĝin rompiĝi. Sed li ekvidis kaj batis min.

La koron de Ŝarik plenigis fiero. Neniu neniam, eĉ lia hund-amiko Polkan, estis tiel fidema al li, kiel tiu ĉi knabo.

Kaj la knabo, komfortiginte sin en la budo, imagis sin en malproksima vojaĝo, toleranta diversajn mizerojn, kiaj ordinare okazas survoje al ĉiuj vojaĝantoj.

La knabo foĝesis pri Ŝarik, dro-ninte en siaj pensoj, kaj Ŝarik kuŝis apude senmove, por ne timigi sian karan gaston.

Pasis jam multa tempo, Ŝarik vidis kiel la griza virino serĉis la knabon kaj kelkfoje vokis lin. Poste eliris la viro kaj diris: „Preparu manĝaĵon! Ni ne atendu tiun aĉulon!“

Ekodoris je vianda saŭco. En la naz-truoj de Ŝarik ekjukis la deziro gustumi almenaŭ iomete de la vianda saŭco. Kaj eĉ la knabo, verŝajne, aperis la sama deziro, ĉar li denove ekploris. Ŝarik komprenis lin. Ili ja de la mateno sidas malsataj en la budo.

Ŝarik disfosis la kaveton, kie estis kaŝita la panpeco, prenis ĝin inter la dentojn kaj metis ĝin apud la knabon. Ŝarik deziris diri, ke li petas pardonon pro tia modesta tagmanĝo, sed li ne estas kulpa. Ŝarik glutis salivon kaj penis forturni sin de la dolĉa peco. Tamen la knabo eĉ ne atentis la donitan al li pecon. Li streĉe aŭskultis la klakadon de tranĉiloj.

La knabo elrampis el la budo kaj kuris al la domo. Ŝarik rigardis post lin, formanĝis la panon, sed ne eksentis grandan plezuron. Li volis krei post la blondbukla knabo reveni. Kaj krome li volis diri, ke la rusta ĉeno tre dolorigas la kolon. Sed li nenion sukcesis diri kaj nur longsone ekhurlis. . .

El „Por la paco“ n-ro 12



TRA LA GAZETARO

En ĵ. «**Zname na Truda**» — u. Târgoviște (12 kaj 14. VIII. 1976): ampleksa raportaĵo sub tiu titolo „Kun kantoj sub la ĉielo de Akropolo“ de Ĥris’o Radev — pri la par’opreno de kanthoro „Rodna Pesen“ el u. Târgoviște en la Universala Kongreso de Esperanto en A’eno.

En la uzina ĵurnalo «**Avtostroitel**» — uzino „Maĝara“ en u. Ŝumen (16. VIII): „Kongreso de la amikeco“ — informo pri la 39-a kongreso de la bulgaraj esperantistoj en Ruse.

En la sama ĵurnalo (4. XI): artikolo de Cvja’ko Todorov pri la gastado de la sove’a esperantisto Vjaĉeslav Ruraĉenko ĉe la uzina esperantisto ing. Dimi’ro Minĉev.

En la uzina ĵ. «**Blagoevsko Zname**» — uzino per sukeraĵoj en u. Ruse (26. VIII): informo, ke en esperantlingva broŝuro aperis teksto pri la laboro de la uzino.

En la semajna ĵ. «**Impuls**», eldono de la Ministerio de Komunikado (5. X): artikolo „Esperanto — lingvo de la paco kaj amikeco“.

En ĵ. «**Dunavska Pravda**» — Ruse (9. X): artikolo „Ĉu vi deziras lerni Esperanton?“ de S’efan Popov ligo kun la nova lernojaro de Esperanto.

En ĵ. «**Ŝumenska Zarja**» — u. Ŝumen (14. X): informo de Cvjatk'o Todorov pri vig-laj korepondaj ligoj de la lokaj esperantistoj kun la esperantistoj de GDR.

En ĵ. «**Septemvrijsko Zname**» — u. Pa-zarĝik (14. X): informo de Konstantin Gen-ĉev pri solena esperantista vespero en Pazar-ĝik kun preleganto prof. ĉ-ro S'ojan Ĝuĝev.

En ĵ. «**Rabotničesko Delo**» — Sofia (16. X): ampleksa artikolo de Nikola Aleksiev, prezzi-danto de MEM, sub titolo „La noblaj celoj de la E-movado.

En ĵ. «**Zagorsko Zname**» — u. Nova Za-gora (20. X): artikolo „Esperan'o — lingvo de ĉiuj popoloj“ de Anton Genov.

En la monata «**Informa Bulteno**», organo de la Nacia Komitato por Eŭropa Sekureco kaj Kunlaboro (n-ro 20, oktobro 1976): eldiro de Nikola Aleksiev, prezidanto de MEM, en la kunsido de la Kulturkomisiono ĉe la Internacia Konsilantaro por Eŭropa Sekureco kaj Kunlaboro.

En la sama numero: konciza eldiro de Di-mi'ro Bratanov, prezidanto de la Bulgara Komisiono, rekonanta la porpacajn materialojn en gazeto „Bulgara Esperantisto“.

En ĵ. «**Dimitrovsko Zname**» — u. Pernik (12. XI): ampleksa artikolo „Lingvo por ĉiuj“ de Pera Ivanova.

En la semajna gazeto «**Narodna Kultura**» — Sofio (13. XI): artikolo „En Ateno kun la Bulgara Esperanto-Teatro“ tre favora pri ĝia spektaklo.

En ĵ. «**Borba**» — u. Veliko Târnovo (23. XI): informo kun foto pri tutmonata ekspozicio de folklorajoj el 30 landoj, kolektitaj per Espe-ranto de Ĥristo Dolĉinkov.

En ĵ. «**Narodno Delo**» — u. Varna (3. XII): informo pri okazonta ĉiuturba solenaĵo okaze de la 70-jariĝo de doc. Georgi Dimov, konata E-aganto.

En la uzina ĵ. «**Sviloza**» — Kemja Uzino en u. Svišov (5. XI): ampleksa raportaĵo de ing. Mi'ko Nenkov pri vizito de E-grupo el Svišov (plejparte el la uzino) en GDR.

Listo de E-veteranoj

En «Informilo» de Internacia E-Muzeo en Vieno, n-ro 4/1976, estas donita listo de 73 E-veteranoj aliĝintaj al la Veterana Esperan-tista Klubo post junio 1976: 67 el Bulgario, 5 el Sovetunio, 1 el Ĉeĥoslovakio.

Internacia motocikla ralio de amikeco oka-zos en julio 1977 — ĉirkaŭ 2600 kilometrojn tra 4 socialismaj landoj. Informojn sendas *Junulara Esperanto-Rondo „Leviĝanta Stelo“*, p. k. 312, PL 50-952 Wrocław 17, Pollando.

DEZIRAS KORESPONDI

Anglio

Kathryn Bilbrough — Alexandra Residential Club, 133, Woodstock Road, Oxford (studentino).

Bulgario

Elena Dimitrova — m. s. „Ĉerno More“, str. S. Dimov 2, okr. Burgaski (23-jara ofi-cistino).

Mirijka Georgieva — str. A. Manĉev 49, Burgas (23-jara kontistino).

Radka Lazrova — str. Ŝejnovo, Burgas (24-jara akuŝistino).

Janka Ang. Dimova — k-s Slavejkov bl. 23, Burgas (24-jara oficistino).

Hungario

Angela Wolf, str. Cokorai 16, H-1193 Budapest (kolektistino, bk).

Fino Dierö Csilla, H-8900 Zalaegerszeg, Mássiroh u. 5—7.

Fino Bottyán Teréz, H-8900 Zalaegerszeg, Má siroh 5—7.

Fino Vass Ilona, H-8995 Zalacséb, Kossuth u. 57.

Sovetunio

Raja Zharĉenko — 644 063 Omsk, str. 20 let RSKA, d. 246, loĝ. 4 (17-jara — pm, muz. kn).

Sergo Korih — 644 020 Omsk, str. Irĉiŝskaja naberejnaja d. 48, loĝ. 112 (18-jara — moder-na muz.).

Ril'an Gabdul'in — 644 077 Omsk, str. Par-kovaja d. 40, loĝ. 524 (19-jara — pm, muz., sporto).

Ira Fomina — 644 074 Omsk, str. Strojtelej d. 4-a, loĝ. 14 (19-jara — liter., sporto, ling-voj).

Olja Ĥtjko — 644 077 Omsk, str. Parko-vaja d. 40, loĝ. 503 (20-jara — poezio, sporto).

Ljuba Agudalina — 644 077 Omsk, str. Par-kovaja d. 40 (21-jara — mod. muz.).

Tanja Vinnikova — 644 074 Omsk, str. S'troi-telej d. 5, loĝ. 11 (18-jara — liter., poezio).

En Karlovo forpasiĝis nia sindona E-aktivulo

Nikola Ganev

12 jarojn prezidanto de la loka E-ocieto „Va-sil Levski“, membro de la Centra Es'raro de BEA.

*

En Kneĵa tute nea'endite forlasis niajn vi-cojn

Dimitro Kjosovski

44-jara arĉa esperantisto, kursgvidanto, dele-gi o de UEA.

Niajn kondolencojn!